
身命をかへりみずして

Ne konsiderante sian vivon

山口真一 / Yamaguti Sin'iti

仏教は 2500 年前にインドで生まれ、時代と地域を超えて、今日全世界に広まっています。その因が教えそのものの力であるとすれば、いっぽうで縁として幾多の仏教者（人=にん）の力を見過ごすことは出来ません。

例えば、玄奘三蔵。27 歳で長安を出発し、インドに学び、再び戻ってきたのは 43 歳の時でした。それより以前、法顕三蔵が数名の僧と共にインドへ旅だったのは 62 歳の時、ぶじに帰国できたのは彼一人、76 歳の時でした。鑑真和上。五回の渡航失敗、そして失明にもかかわらず、正しい戒律を日本に伝えて多くの僧侶を指導しました。日本では河口慧海、鎖国下のチベットに二回潜入してチベット一切経など貴重な資料を持ち帰りました。

法華経に「不惜身命」という語があります。一般的には、「仏道を修めるためにはみずからの身命をもかえりみないこと」とされています。

歎異抄では、親鸞が弟子に対して、「おのおの十余箇国のさかひをこえて、身命をかへりみずして、たづねきたらしめたまふ御ころごし、ひとへに往生極楽のみちを問ひきかんがためなり」と言っていますが、玄奘三蔵であれ、親鸞の弟子であれ、譬喩ではなく文字通りの不惜身命であったと、思いをいたさねばなりません。

Budhsimo naskiĝis en Hindio antaŭ 2500 jaroj, kaj nun disvastiĝis en la tuta monto trapasante regionajn kaj tempajn murojn. Dum la kaŭzo estas la forto de la instruo, ni devas priatenti kiel kondiĉon la fortojn de multege da budhanoj - homoj -.

Ekzemple, majstro XuanZang. Li 27-jaraĝa ekiris de Chang'an, studis en Hindio, kaj revenis hejmen 43-jaraĝa. Antaŭ li, majstro FaXian 62-jaraĝa ekiris al Hindio kun kelkaj bikŝuoj, kaj revenis sola 76-jaraĝa. Majstro Jianzhen, malsukcesinte 5 fojon atingi Japanion kaj perdinte vidkapablon, finfine alvenis al Japanio kaj gvidis budhanojn sub ortodoksa preceptaro. En Japanio menciindas Kawaguti Ekai, kiu kaŝe eniris du fojojn en Tibeton, tiutempe enŝlosinta pordon kontraŭ alilandanoj, kaj havigis al si la sutraron de la tibeta budhismo.

La Lotusa Sutro alte taksas "ne domagi vivon." Tio estas sinteno de tiuj, kiuj ne konsideras sian vivon por praktiki la vojon.

Sinran iam diris al la disĉiploj, "Vi venis vidi min, travojaĝante la limojn de pli ol dek provincoj je risko de via vivo, nur kun la intenco demandi la

しかし、だからといって、軽率、蛮勇、無鉄砲であってはなりません。道元は、「不惜身命なり、但惜身命なり」と『正法眼蔵』で言っています。不惜の道と但惜の道とが共に最高のあり方であればなりません。

戦時において、「不惜身命」が、国のために戦って命を捨てる、というような意味にとられて、道を誤りました。私たちは、思いの外、命を捨てても惜しくはない、という気分になることがあるものですが、それは本当の不惜身命ではありません。命を捨てる、のではなく、命を賭してでも、という目標があることが重要なのです。それは真理であるかも知れませんが、慈悲であるかも知れません。

ですから、何かと比べて「命がいちばん大切だ」ということでもないのです。「人の命は地球よりも重い」というのはおよそ無意味です。なぜならば両者は比較しようがないからです。命は大切に尊いものですが、その尊さは「不惜身命」において成り立つものです。

命が
いちばんだと思っていたころ
生きるのが苦しかった
いのちより
大切なものが
あると知った日
生きているのが
嬉しかった

(星野富弘)

「いのち」より大切なものを問い尋ねるのが宗教であり仏教なのです。

vojon al la Pura Lando." Ĉu XuanZang, ĉu disĉiploj de Sinran, ili ĉiuj litere - ne metafore- ne domaĝis sian vivon. Tion ni devas imagi.

Sed ni devas ne esti temeraraj kaj bravaĉaj. Dougen diris, "Ne domaĝu vivon. Nur domaĝu vivon." Ambaŭ vojoj de ne-domaĝo kaj nur-domaĝo devas esti la pintaj.

Dum la milito en Japanio oni erare komrenis "ne domaĝi vivon" kiel forĵeti vivon batalante por la ŝtato, kaj vojeraris. Ni foje emas fari ion riskante nian vivon. Sed tio ne estas la vera ne-domaĝo. Estas grave havi celon, ĉu veron, ĉu kompaton, por kiu ni povas riski vivon, sed ne forĵeti vivon.

Tial oni ne povas diri, "vivo estas la plej grava" komparante kun io. La tezo "homa vivo estas pli peza ol la tero" estas tute sensenca, ĉar ili du ne estas kompareblaj. Vivo estas kara kaj respektenda, sed tiel oni povas diri surbaze de "ne domaĝi vivon."

Kiam mi pensis,
ke vivo estas la plej kara,
vivo min suferigis.
Kiam mi eksciis,
ke ekzistas io pli kara ol vivo,
vivo donis al mi ĝojon.

(Hosino Tomihiro)

Kaj budhismo kaj religio igas nin demandi al ni mem, kio estas pli kara ol vivo.